

Caroline Keppel,  
Sen la karul'

*tradukita de Adela Schafer*

Ĉio tedegas min -  
forestas li!  
Ĉio malplaĉas nun  
sen simpati'.

Ĝojo kaj feliĉec'  
forflugis pro tedec';  
ho, mi ploregas nun  
sen la karul'.

Ĝaje moviĝis mi  
en la dancad';  
kun li koncervesper'  
estis ĝuad'.

Sed post la ekforir'  
regadis min dezir',  
kaj sopiradis mi  
al la karul'.

Min, kruelulo, nun  
ne amas vi!  
Kial forflugis jam  
korsimpati'?

Lin eĉ en malesper'  
nur amas mi sur ter',  
kaj restas kun mizer'  
sen la karul'.

...

Caroline Keppel,  
Robin Adair

What's this dull town to me  
Robin's not near  
What was't I wish'd to see  
What wish'd to hear

Where all the joy and mirth  
Made this town heaven on earth  
Oh, they're all fled with thee  
Robin Adair

What made th' assembly shine  
Robin Adair  
What made the ball sae fine  
Robin was there

What when the play was o'er  
What made my heart so sore  
Oh, it was parting with  
Robin Adair

But now thou'rt cold to me  
Robin Adair  
But now thou'rt cold to me  
Robin Adair

Yet he I loved so well  
Still in my heart shall dwell  
Oh, I can ne'er forget  
Robin Adair

...

*Traduko de la Angla poemo "Robin Adair" de CAROLINE KEPPEL (\*1734 - †1769) en Esperanton de Adela Schafer.*

*Arg-1025-2078 (2014-05-28 13:34:56)*

*Tiun ĉi kanto-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro "Internacia Kantaro", eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt und Sohn en Lipsiko (Leipzig), Germanio, sur la paĝo 50 kaj 51. La kantojn kolektis kaj eldonis Paul Bennemann. Tie estas, verŝajne erare, indikite, ke la origina angla-lingva teksto estas verkita de la skota poeto Robert Burns.*

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas CAROLINE KEPPEL (\*1734 - †1769).*

*Arg-1025-2077 (2014-05-27 15:55:44)*

*La teksto de tiu ĉi kanto troviĝas en [http://www.traditionalmusic.co.uk/folk-song-lyrics/Robin\\_Adair.htm](http://www.traditionalmusic.co.uk/folk-song-lyrics/Robin_Adair.htm). Pri Robert Adair vidu la retejon [http://en.wikipedia.org/wiki/Robert\\_Adair\\_\(politician\)](http://en.wikipedia.org/wiki/Robert_Adair_(politician)).*

*Legu ankaŭ: <http://www.lookandlearn.com/blog/2482/lady-caroline-keppels-sad-love-song-immortalised-young-robin-adair>*

*Vidu ankaŭ: <http://www.bartleby.com/360/3/74.html>.*

*La kanto estas aŭdebla en [http://www.youtube.com/watch?v=51cI0\\_eznLU](http://www.youtube.com/watch?v=51cI0_eznLU).*